

Esperanto – tutmonde ligita



Preskaŭ 200 Esperanto-parolantoj kunvenis dum la pentekostaj tagoj en Zweibrücken apud la german-franca landlimo. Estis trilanda kongreso kun la partopreno de la franca, germana kaj luksemburga asocioj kaj gastoj el aliaj landoj. Necesis venki kelkajn organizajn defiojn: la altlernejo tie tre taŭgis por la eventoj de la kongreso, sed situas ekster la urbo. Prizorgi manĝojn kaj trinkaĵojn do aldoniĝis al la taskoj de la organizantoj. Sed ĉio bone finiĝis, kaj dum la konkluda kunveno eĉ aŭdiĝis laŭdo por la kvalito de la manĝoj. Partoprenis pluraj libroservoj kun oferto simila al tiu de Universala Kongreso, okazis laborkunsidoj kaj jarĉefkunvenoj de partoprenantaj asocioj, krome deko da fakaj kunsidoj kaj prelegoj kun aŭ sen rilato al la kongresa temo “Esperanto – tutmonde ligita”. Podian diskutadon kaj retan elsendon pri “Esperanto kaj interreto” organizis dum unu vespero la teamo de movada-vid.punkto, Johannes kaj Eva. Kaj la duan vesperon muzik- kaj dancgrupoj pruvis la multkulturecon de la kongresurbo Zweibrücken, sekvataj de “La Kompanoj” el Francio kun kantoj de Jacques Brel en Esperanto.

La Reinhard-Selten-aŭlo (nomita laŭ la nobelpremiito kaj esperantisto, kiu mem iam prelegis en la altlernejo de Zweibrücken) dum tri tagoj fariĝis manĝejo, movada foiro kaj ĉefa renkontiĝejo de nia esperantista komunumo. Raportis lokaj gazetoj kaj la regiona televido, salutis la kongreson la ministroprezidantino de Rejnlando-Palatinato, la aganta urbestro de Zweibrücken, la urbestro de ĝia ĝemelurbo Boulogne-sur-Mer (bone konata al esperantistoj) kaj la prezidanto de la altlernejo, kiu mem partoprenis en la malfermo. Salutmesaĝoj venis ankaŭ de Margaret Zaleski-Zamenhof kaj de la UEA-prezidanto Mark Fettes.

Kadre de la kongresa temo ni diskutis kiel rilatigi nian propran tutmondecon – evidentan por esperantistoj jam dum 130 jaroj – kun la tutmondiĝo, kiun hodiaŭ ofertas la interreto kaj sur ĝia bazo aro da modernaj komunikiloj. Neniam estis pli facile informiĝi pri Esperanto (kaj pri ĉio alia), neniam pli facile eklerni nian lingvon (same kiel aliajn). En sia prelego Chuck Smith (kunfondinto de la Esperanto-Vikipedio, la Esperanta versio de la interreta kurso Duolingo kaj de la reta ligilo Amikumu) raportis pri la progreso de Esperanto en la reto. Li ankaŭ donis ekzemplojn, kiel el la reto povas fariĝi komunumo, kiu reale kunvenas kaj organiziĝas. Interesa aspekto: tio okazas ĉefe en Usono, ĝis nun ne konata kiel centro de esperantista vivo.

Alian agadkampon gravan por ni pritraktis Seán Ó Riain en sia enkonduka prelego. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio raportis pri ties ĉefaj okupoj: informi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia kapablo kontribui al multlingveco en Eŭropo – do al deklarita celo de la Eŭropa Unio – kaj pri ĝia ebla kontribuo al la kreiĝo de eŭropa identeco. Ambaŭ temoj rilatigas la internacian lingvon al la aktuala debato pri stato kaj estonteco de la Eŭropa Unio: Esperanto ne staras flanke, sed povas esti parto de la solvo. La avantaĝojn de nia lingvo komencas malkovri ankaŭ interesa celgrupo, pri kiu en

Zweibrücken raportis Chuck Smith kaj Charlotte Scherping Larsson: la multlingvuloj, kiuj de kelkaj jaroj kunvenas en "Polyglot Gatherings". La fakto ke inter ili 20-30 procentoj jam parolas kaj uzas Esperanton estas bela pruvo ke nia lingvo ne celas anstataŭi aliajn, sed male subtenas multlingvecon kaj lingvan egalrajtecon.

La decida demando por mi post tia evento estas: ĉu valoris la multan laboron, kaj kiel ni nun daŭrigu? Mi foje aŭdis la argumenton ke en la hodiaŭa interreta mondo kongresoj ne plu estas bezonataj (same kiel lokaj grupkunvenoj kaj entute la ekzisto de Esperanto-asocioj). Mi ne konsentas kun tiu argumento: kunvenoj necesas jam pro statutaj kialoj, kaj vivanta lingvo almenaŭ jen kaj jen bezonas esti parolata en la reala mondo. Krome geamikoj volas havi okazon renkontiĝi, kaj kongresoj ĉiam estas bonaj okazoj por atentigi la reston de la mondo ke ni ekzistas, eĉ kreskas. En ideala kazo ni revenas de kongreso kun nova optimismo. Laŭ ĉiuj kriterioj la kongreso en Zweibrücken valoris la penon. Grandan dankon al la LKK kaj ĉiuj aliaj, kiuj ĝin helpis organizi! Kaj ĝis revido post unu jaro proksime al nia norda limo en Neumünster.

Ulrich Brandenburg